

Kapto de la Venezuela prezidanto

4-an de januaro, 2026.

La prezidanto de Venezuelo, Nicolás Maduro, estis kaptita de Usono sabate, laŭ afiŝo provizita de Usona prezidanto Trump per socia reto. Trump diris al raportistoj, ke Maduro estis en domo, kio estis kvazaŭ fortikaĵo situanta en Karako. Trump motivis ĉi tiun faron per aserto, ke Maduro estas estro de la "Cartel de los Soles", kaj subtenanta kontraŭlegan enmigradon de danĝeraj homoj en Usonon. Aŭtoritatoj en Venezuelo petis kunvenon depost la atako.

La BBC raportis aerajn atakojn en Karako, kiuj celis la aerbazon nomatan "La Carlota" kaj la militbazon nomatan "Fort Tiuna". Laŭ suspekto de Usono, Maduro restis tie, kaj en aliaj lokoj. Laŭ aŭtoritatoj ekzistas raportoj de civilaj mortoj kaj vunditoj, tamen la preciza nombro ankoraŭ estas nekonata.

Post la kapto, la Usona departamento de justico rivelis akuzon direktitan al Maduro, kiu temis pri konspiro de narkototerorismo kaj importo de kokaino. Laŭ la BBC, Maduro neis tiun, kaj diris, ke la reala celo de Trump temas pri la aliro al la nafta rezervo de Venezuelo.

This article is a translation of “United States capture Venezuelan president, Nicolás Maduro” by Wikinews contributors, originally published on Wikinews.
Source:
https://en.wikinews.org/wiki/United_States_capture_Venezuelan_president,_president,_Nicolás_Maduro
Licensed under Creative Commons Attribution 2.5 (https://creativecommons.org/licenses/by/2.5/)
This translation was made by Eduardus-eo. Any errors in translation are my own.